# TEJO-aktuale: numero 172, 2005-08-20

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 172 (17 aŭgusto 2005)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>

---

1. ALIĜOJ AL INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ ANKORAŬ AKCEPTATAJ
2. SKRIBU ARTIKOLOJN PRI LA ĴUS ĈEESTITAJ FESTIVALOJ/KONGRESOJ
3. AKTIVIĜU! SPERTIĜU! EKSTERAJ RILATOJ GRAVAS!

---

1. ALIĜOJ AL INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ ANKORAŬ AKCEPTATAJ

La limdato por akcepto de la aliĝoj al la
Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato de
Adam Mickiewicz en Poznanjo (Pollando) estis eksterordinare
plilongigita al ĉi-sabato 2005-08-20. Temas pri 3-jara studado,
kiun eblas komenci ĉiun trian jaron, plej proksime ĵus
en la studjaro 2005/2006. La internacia kursaro okazas en
la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-rino Ilona Koutny,
kunlabore kun multegaj konataj esperantologoj.
Unusemajnaj intensaj sesioj okazos unufoje dum la semestro
(fine de septembro kaj komence de februaro). La studentoj pretigos
diplomlaborajon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri
Interlingvistikaj Studoj.
ESF (Esperanto Studies Foundation) certigas kelkajn stipendiojn.
Postulo: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno au egalvalora,
post 12 jara lernado) kaj bona scio de esperanto.
Kotizo por unu semestro: 400 EUR (por B-landoj ĉirkaŭ 150 EUR (600 PLN)).
Detalojn legu ĉe la paĝo
http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

Por pluaj informoj kaj aliĝilo kontaktu d-rinon Ilona Koutny:
Lingvistika Instituto de UAM
ul. Mie,dzychodzka 3-5.
PL-60-371 Poznan'
T: +48-61 829-27-09
T(hejma): +48-61 872-83-09
F: +48-61 829-27-00 (sekretariejo)
E: ikoutny@amu.edu.pl
http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

---

2. SKRIBU ARTIKOLOJN PRI LA ĴUS ĈEESTITAJ FESTIVALOJ/KONGRESOJ

Kompreneble, ni ĉiuj ŝatas partopreni E-eventojn -- kaj poste kompreneble
legi pri ili en TT! Sed iu ja devas verki ĉiun artikolon en la revuo.
Pro tio ni petas la helpon de vi, karaj legantoj (des pli ĉar la redaktoroj
mem ne povis partopreni iun eŭropan E-kongreson ĉi-somere). Ni do nun
serĉas ĵurnalistojn por TT, t.e. legantojn kiuj pretas verki/raporti
pri iu(j) E-aranĝo(j) aŭ iu aspekto de ĝi (ili). Aparte bezonatas
kontribuoj pri la IJK en Zakopane kaj la UK en Vilno! Bv. sendi viajn
kontribuojn al:

tejo-tutmonde(ĉe)tejo.org

---

3. AKTIVIĜU! SPERTIĜU! EKSTERAJ RILATOJ GRAVAS!

Multaj novaj detaloj pri trejnkursoj, konferencoj kaj simpozioj
(senpagaj!) aperis lastatempe sur la listo tejo-ker@yahoogroups.com.
KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj) serĉas aktivulojn kiuj
interesiĝus partopreni kiel reprezentantoj de TEJO.
BV aliĝi la liston kaj/aŭ kontakti la respondeculon pri KER ĉe la
adreso ker@tejo.org

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>.
La arkivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>.
La aliĝo: <http://www.abonu.com/catalog/info.tejo>
Informojn kaj komentojn sendu al <aktuale-red@tejo.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij GAUS kaj Marteno MINIĤ.
Tiun ĉi numeron redaktis Marteno MINIĤ.

-*---------------------------------------------------------------------------
Malabonu: //abonu.com/member/unsub?grp=info.tejo&email;=oficejo@tejo.org" class="hft-urls">http://abonu.com/member/unsub?grp=info.tejo&email;=oficejo@tejo.org
Elektu alian kodigon: //abonu.com/member/format?email=oficejo@tejo.org" class="hft-urls">http://abonu.com/member/format?email=oficejo@tejo.org

http://abonu.com/ mailto:demandu@abonu.com